

INFORMOJ je la 11a de aprilo 2015

Présence de « Espéranto-Indre » à l'Envolée des livres, les 18 et 19 avril, à Châteauroux, au couvent des Cordeliers. Stand avec la Maison des Droits de l'Enfant.

Nous avons reçu de :

- **J.M.CASH : Komuniko de Le Monde diplomatique en esperanto.**
« La islamismaj atencoj en Parizo (7 kaj 8-an de januaro), kaj nun en Kopenhago (14-an de februaro) kaŭzis stuporon en la mondo. Post la stuporo kaj indigno, venas la deziro kompreni, kaj restas obseda demando : Kial, en paco-kunteksto, junaj francoj (kaj danoj) kapablis ataki tiel perforte individuojn, elektitajn pro siaj opinioj, aŭ sia supozata religia kredo ? Ĉu la kolizio de kulturoj estas neevitebla? Por provi respondi tiujn demandojn, la franca monatkazeto *Le Monde diplomatique* publikigis tutan dosieron « Atencoj de Parizo, la ŝok-ondo ». *Le Monde diplomatique en esperanto*, <http://eo.mondediplo.com/> ĝia reta esperanto-eldono, publikigas plurajn el tiuj artikoloj : « La vojoj de radikaligo », de Laurent Bonelli <http://eo.mondediplo.com/article2187.html> kaj « Islamofobio aŭ proleto-fobio? », de Benoît Bréville <http://eo.mondediplo.com/article2189.html> . Jeanne-Marie CASH, (membro de la traduka teamo) ».

- **CENTRE CULTUREL ESPERANTO-TOURAINÉ : La cirkulero 92 kaj Turanĝian Lukon 37.**
« Saluton, Bonan legadon ! Amike. Jacques Gaumé ». *Voir documents joints*.

- **CLAUDE NOURMONT : Kvinpetalo organizas serion da altnivelaj staĝoj.**

« La venonta okazos de la 20a ĝis la 24a de aprilo.

Temos pri **ekzercado pri altnivela tradukado**. Gvidos ĝin **Brian Moon**, vic-prezidanto de la Akademio, profesia tradukisto. La vorto « altnivela » tamen ne timigu vin! Tiu staĝo taŭgas ankaŭ por preparado al atesto pri supera lernado de Franca Esperanto-Instituto. **Pri tradukado necesas aparte ekzerci sin**, kaj dum tiu ĉi semajno ni faros ĝuste tion, esperantigante francajn tekstojn plej diversajn. La celo estas tradukado altnivela, sed ankaŭ plibonigo de la lingva nivelo en Esperanto, ĉar analizi tradukproblemojn povas konduki ankaŭ al lingvolecionoj. Partoprenantoj de diversaj lingvoniveloj estos do bonvenaj.

Malkrokodilado garantiata ! Pri teknikaj detaloj, vidu la retejon de Kvinpetalo <http://www.kvinpetalo.org/>

Kaj poste okazos la jeno:

Dimanĉe la 26an de aprilo okazos la **Ĝenerala asembleo de SYM** je la 10a.

De la 27a de aprilo ĝis la 1a de majo Ansofi Markov gvidos **plurnivelan staĝon**.

De la 14a ĝis la 18a de majo okazos denove **staĝo por lerni ĉiĉeronadon, sub gvido de Anne Amblès**, profesiulino pri turismo, homaj rilatoj kaj trejnado. Ĝi celas la gvidontojn-ĉiĉeronojn, iliajn helpontojn, kaj la tradukontojn, por la turisma programo de la Universala Kongreso en Lillo en 2015. La akiritaj kompetentoj utilos ie ajn, interalie por prepariĝi al la faka branĉo "Turismo kun Interpretado" de la **Atesto pri Kapableco**

de FEI. KVINPETALO Esperanto-Centro : Akceptejo kaj poŝta adreso: 4 rue du Bureau FR-86410

BOURESSE, Retadreso: informoj @ kvinpetalo.org (forigu la spacojn), Telefono : (+) 33 (0) 549 034 314 aŭ se ne respondas: (+) 33 (0) 6 07 31 67 81

GRAVE: Se vi aliĝas **minume unu monaton antaŭe**, vi ĝuos specialan rabaton. Profitu ĝin: **por la staĝo pri tradukado restas ankoraŭ du tagoj (ĝis 20a de marto) por ĝui rabaton. Bonvenon en Kvinpetalo!** »

- **BERT SCHUMANN : PRINTEMPaS à Grésillon.**

Cours intensifs et examens 2015.

Cours avec Zsofia, Christophe ou Marion Quenut (17 - 25 avril 2015)

ET / OU Passez un examen international d'espéranto (25 - 26 avril 2015).

Les stagiaires inscrits à l'examen ne paient pas la nuitée du 25 au 26 avril.

Plus d'informations dans: [/gresillon.org/printemps](http://gresillon.org/printemps), inscriptions dans: gresillon.org/inscription.

Intensivaj kursoj kaj ekzamenoj 2015.

Kurso kun Zsofia, Christophe aŭ Marion Quenut (2015-apr-17/25)

KAJ / AŬ Trapasu internacian Esperanto-ekzamenon (2015-maj-25/26).

Staĝanoj ekzameniĝantaj ne pagas la tranokton de la 25a ĝis 26a de aprilo.

Pli da informoj en: [/gresillon.org/printempas](http://gresillon.org/printempas), aliĝo en: gresillon.org/aligho.

Gxis.

Renseignements complémentaires : 02 54 27 95 51 ou 06 78 90 92 17